# Aŭtuna Naskigonta Tragedio

## de Sylvan Zaft

Folioj birdas teron.
Homoj folias morton.
Birdoj homas imagon.
Folioj teriĝas.
Homoj teriĝas
Birdoj surteras.
El mortaj folioj ruĝfloroj enlumos.
El homaj korpoj verdvermoj dikiĝos.
El intaj birdoj arĝentmetaforoj ĉielos.

*El Fonto, Numero 199, julio, 1997*